

## La 45a Korea Kongreso de Esperanto

Korea Esperanto-Asocio(KEA) okazigos la 45-an Korean Kongreson de Esperanto inter la 26a kaj la 27a de okt., 2013 en Junulara Trejnejo en la urbo Incheon. Je tio KEA invitas esperantistojn enlandajn kaj eksterlandajn kun buntaj programeroj.

**Temo : Esperanto kiel dumviva lernado**

**Dato : 26(sab.)~27(dim.) oktobro 2013**

**Ejo : Junulara Trejnejo en la urbo Incheon**

**([http://www.insiseol.or.kr/institution\\_guidance/youth1/index.asp](http://www.insiseol.or.kr/institution_guidance/youth1/index.asp))**

**Organizanto : Incheon-Filio de Korea Esperanto-Asocio**

### Demandu pri la kongreso al KEA

Adreso : 1601 Gangbyeonhansin Core B/D., 350 Mapødong, Mapo-gu, Seoul  
121-703 Koreio

Tel. : +82-2-717-6974

Fakso : +82-2-717-6975

Retadreso : [kea@esperanto.or.kr](mailto:kea@esperanto.or.kr)

TTT-ejo : <http://www.esperanto.or.kr>

Kongresejo : [http://www.insiseol.or.kr/institution\\_guidance/youth1/index.asp](http://www.insiseol.or.kr/institution_guidance/youth1/index.asp)

### Programo

<b>26(sab.) okt.</b>	<b>27(dim.) okt.</b>
13:00-22:00 Malfermo de kongresejo	08:00-08:50 Matenmanĝo
15:30-16:20 Fakaj Kunsidoj I	09:00-10:00 Fakaj Kunsidoj II
16:30-17:50 Kongresa Universitato	10:10-12:00 Simpozio
18:00-19:00 Vespermanĝo	12:00-12:10 Memorfoto
19:10-22:00 Malferma Ceremonio	12:10-13:00 Tagmanĝo
Interkona Vespero	13:30-14:30 Ferma Ceremonio
Aŭkcio	

## **Informoj pri aliĝo**

- \* Aliĝo-kotizo por ne-koreoj estas 40,000ŭonoj.
- \* La valuto estas korea ŭono(₩)
- \* B.v. anoncu al LKK paperan partoprenon k monkontribuojn.
- \* La kotizo inkluzivas tri manĝojn kaj unu tranokton.
- \* LKK ne akceptas aliĝilon sen kompleta pago. Ne-koreaj partoprenantoj povas pagi surloke.
- \* Invititoj povas ĝui senpagan aliĝon.
- \* Donacoj al aŭkcio : La sumo de la aŭkcio eniros en la fonduson de junulara Esperanto-movado.
- \* Fakaj kunsidoj : B.v. anoncu sian aliĝon ĝis la 30a de sep. al la LKK.

## **Postkongresa ekskurso en Incheon Parko**

Malantaŭ la kongresejo Junulara Trejnejo disvolviĝas vasta ĝardeno kun malgrandaj marĉoj laŭlonge de rivereto. Kaj post 10 minutoj da promenado laŭ apudvojaj arboj tra la ĝardeno troviĝas la 'Incheon Parko'.

La parko estas la plej granda en la urbo Incheon kaj agrabla ripozejo kun plantejo, vasta arbejo kun sovaĝaj floroj, rozejo, biciklejo, malgranda zoologia ĝardeno, diversaj figuraj artaĵoj, granda lago kaj eĉ monteto, sur kiu oni povas rigardi la urbon.

En la parko oni povas sufiĉe ĝui la belan pejzaĝon kun kolororiĉaj aŭtunaj folioj. Ĉu vi ne volus sperti korean aŭtunon? Ĉe la 45a Korea Kongreso de Esperanto, tio eblos senpage.